N°17 (35) Februaro 79

ISSN 0150-5823




Bimestriel culturel d'information & d'expression espérantiste
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. Unu n°:2F
oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Eldonas: Cercle espérantiste de l'Agenais 47340 Laroque Timbaut
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux

Abono por unu jaro : 10 FF (12 FF por eksterfrancio) al la ĉi-apuda pĉk.
**********************************************************

Sur la pont' el Avinjon'
Oni dancas ĉiuj en rond' !

krome, dum Pasko tie okazos

la 34a K o n g r e s o
de
S A T - A M I K A R O !
**********************

- Jen okazo, kiun nepre volos profiti ĉiuj sunamaj gelaŭtuloj, SAT-amikoj kaj ankaŭ gesamideanoj, kiuj ankoraŭ malmulte scias pri nia laborista E-asocio, pri la neforgesebla frateca etoso, kiu karakterizas ĝin, pri la serioza, efika laboro, kiun ĝi senlace plenumas serve al esperanto !...
- Jes, bone. Sed kie trovi kongresaliĝilon se oni, kiel mi, ne estas membro de SAT-Amikaro ?
- Vi ne estas SAT-Amikarano. Ne gravas! Ankaŭ ne pluraj miliardoj da homoj... Aliĝilon vi trovos tutsimple meze de tiu ĉi "Laŭte". Uzu ĝin plejeble urĝe ! Vi ne bedaŭros ! Do, ĝis baldaŭ en Avinjono, la 14an, 15an, 16an de aprilo ! Kaj memoru : ne utilos la kravatoj !

Laŭte.

ESPERANTO
SAT-AMIKARO

## L A V I V O N E P L U E S T O S M A S K E R A D O ...

Anstataù trankvile malfermi la brakojn al la vivo por ĝin ricevi, ni kredas nin pli ruzaj irante sur la lunon por tie kolekti ŝtonetojn aù instalante atomcentralojn kaj malsuprenirante funde de l'maroj por tie eltrovi petrolon. Ĉio ĉi por pluvivi !

La homo estas filo de la ĉielo kaj de la tero. Ni estas ties produkto kaj la ĉielo kaj la tero ĉiam havos pli da potenco super la homo, ol la homo havos super ili ! Se la naturo estas aĉa duonpatrino por la homo, tio estas ĉar ni malestimis ĝin. La ribelo kontraù ĝiaj leĝoj, la ekspluatado kontraù ĝiaj riĉaĵoj, tio estas nur perforto kaj vampirismo. Oni ekspluatas la teron, oni ekspluatas la beston, oni ekspluatas sian fraton. Nia vivocelo plu estas nur avida vetkurado. Oni stariĝis kontraù kaj disiĝis de la vivo anstataù plu radiki en ĝi.

Ni ĉesu kuradi. Ni ne plu serĉu tagmezon kiam estas la dekkvara. Ni amu la teron kaj ni semu, semu ! Tio natura relokiĝu antaù tio artefarita. Ĉie oni plantu kverkojn kaj baobabojn, abiojn kaj kokosarbojn, unue tie, kie ili povas vivi. Ni plenigu la teron per vitoj kaj figarboj, migdalarboj kaj persikujoj, kaŝtanarboj kaj abrikotujoj, pirarboj kaj ĉerizujoj, kaj miloj da aliaj specoj, kaj refloru la dezertoj. Tiam ŝanĝiĝos la klimatoj, la leono amikiĝos kun la infanoj. Ĉio estos nur rideto kaj gajemo. Estos veninta la tempo, kiam sufiĉos nur etendi la manon por pluki la frukton.

"Tio estas tro simpla. Oni ne povas vivi nur per prunoj!". Jen la stulta respondo, kiu tuj ŝprucas el la buŝo de ĉiuj uzinrobotoj de la tero kun ĉiuj ties malvarmaj kaj senharaj teknokratoj, kies spiriton sekigis la raciismo. "Per kio vi vivos, se vi ne plu manĝos viandon ? Se ne plu estos uzinoj, ne plu estos laboro! Kaj se ne plu estos laboro, kion ni faros ? Kion ni faros por vivi ?"

Ve, la veron oni povos kompreni nur post la atoma disŝutado. Al la homo necesos tiu bona pluvo por refreŝigi kaj restarigi sian cerbon. Nur tiam li komprenos. Kaj nur de tiam li iros de malkovro al malkovro... natura. La telepatio anstataùos telefonon kaj televidon, la aùtoskopio anstataùos la radioskopion, la klarvido forbalaos la komputoron, la realo superos la romanon kaj la fikcion, la frateco regos super la politiko kaj Mamono. La vivo ne plu estos maskerado kaj morto-komedio.

Ni ne plu bezonos fakulojn por instrui al ni kiel manĝi, kiel stari kaj kiel spiri. Ankaù ne plu necesos kursoj pri seksa edukado ! Kaj kompreneble nek teologoj kaj lernejmastroj ! Ĉar ni estos eliĝintaj el la nokto, la taglumo al ni sufiĉos. Ami, kanti kaj danci, jen kio estis nia destino. Tutsimple.

Alph. JACQUEL
(el "L'Homme Libre", n° 73)



*******************************************************

## Novjara perspektivo : Ĉ U B A L D A ù Ĉ I U M O N A T A "Laùte!" ?

La regula kreskado de la abonantaro, la apero de kelkaj novaj aktivuloj en diversaj regionoj, la neceso kiel eble plej akurate informi pri venontaj okazaĵoj, la alveno de relative abundaj kontribuoj... ĉio ĉi trudas ekkonsideri la plioftigon de "Laùte!", se ne kiel nepre necesa, almenaù kiel konsilinda paŝo.

La legantaro certe rimarkis, ke tiu ĉi stranga bulteno jam aperas pli ol 6-foje en jaro, emas frui, kaj ke ties paĝoj plenplenas. Kompreneble, antaù ol transiri al ĉiumonateco endas esplori, ĉu tiu nuna prospero ial ne riskas subite ĉesi, kaj ĉu ne estus danĝere veti pri progresado, kiun ne garantius sufiĉa, fidela, stabila interesataro. Ĉiu bultenprizorganto maltrankvile atendas okaze de la jarŝanĝiĝo la "decidojn" de la abonantaro mem. Tro multaj legantoj esprimas sin nur per sendado (aù nesendado) de ĝirkupono !

"Laùte!", per sia malalta abonkosto, ne lasas al la laca verdstelul(in)o eĉ la pretekston de monmanko. Do, se oni ne reabonas al "Laùte!", tio povas esti nur pro kruda seninteresiĝo. La kaùzoj de "seninteresiĝo" kompreneble ne estas facile difineblaj. Ili povas esti multaj : oni forlasas esperanton, oni ne plu trovas tempon por dediĉi al legado de laùdire tro multaj E-gazetoj, oni troviĝas mem izolita en regiono sen E-vivo, aù... kiel tio almenaù unufoje okazis... oni ne ŝatis unu opinion en unu numero ! Ni preterpase aludu ankaù pri tiuj, kiuj ne kuraĝas legi pri esperanto en esperanto kaj preferas eterne ricevi kuraĝigojn al sia neserioza

hobio... per nacia lingvo.

* * *

Ĉi-rilate la ĝisnuna aspekto de "Laùte!" ne ebligas du-bon : kiel estas kutime en SAT-Amika medio, "Laùte!" sufiĉe fidas la valoron de esperanto por uzi ĝin en ĉiuj siaj paĝoj pri ĉiuj ajn temoj. Al la "E-simpatiantoj", kiuj ankoraù ne sufiĉe simpatias por lerni mem, tiu sinteno eble povas aspekti forpela. Al ni, E-uzantoj, kiuj jam de longe scias kiel danĝera por esperanto estas la agado de fuŝvarbantoj, kiuj mem eĉ ne povas balbuti la lingvon, tiu sinteno prezentas nur avantaĝojn :

- ĝi ja forpelas la eternajn fuŝulojn ;
- ĝi montras al la seriozaj novbakitoj, ke esperanto estas ja vivkapabla lingvo, almenaù tiom esprimiva kiom tiuj, kiujn oni devigite lernas en la respublikaj lernejoj.

* * *

Al la geamikoj, kiuj bezonas nacilingvajn tekstojn por informi la publikon, ni memorigu, ke tia materialo jam abundas (ni aparte rekomendas uzi la dokumenton "Objectif 87", pri kiu "Laùte!" jam aludis), ke de tempo al tempo aperas represotaj komunikoj ("Prière d'insérer") uzeblaj ĉe la franclingva gazetaro (sed ĉu multaj uzas ilin ?) kaj ke SAT-Amikaro kaj la broŝurservo de SAT povas liveri plej variajn varbilojn.

Tial do la venonta "Laùte!" estos aù plu dumonata, aù ĉiumonata, sed ĉiam en esperanto... des pli ke nia bulteno baldaù klopodos havi legantojn/kontribuantojn ankaù en ne-franclingvaj teritorioj, kie ĝis nun ne eblis sendi varb-specimenojn.

Se ni volas konservi la nun tre malaltan abontarifon, "Laùte!" devas havi firman bazon je ĉ. 200 abonoj. En 1978 la abonkvanto atingis 175 (152 en 1977, 108 en 1976). Dudeko da novaj abonantoj jam aperis en la jarfino. Pli ol cento da malnovaj jam reabonis. Post kelkaj semajnoj ni scios, ĉu "Laùte!" povos fari antaùenpaŝon al plioftigo aù ĉu estas pli prudente atendi pli favorajn cirkonstancojn. La respondo dependas de ĉies deziro kaj iniciato.

Kribo.

*********************************************************

Al ĉiu legant(in)o "Laùte!" deziras : almenaù unu laùtan ridegon en ĉiu tago/nokto de 1979 !



# P R O G R E S I (2)

***************

- Parafrazante la konvinkajn dirojn de nia - pli kaj pli morta - kdo Dakapo en lia "Kiĉuaro", ni povas aserti, ke por harmonie progresi en la scipovo de esperanto ni ne forgesu la regulon praktiki esperanton ekvilibre per ĉiuj eblaj rimedoj, nome du pasivaj : <u>aùdi</u> kaj <u>legi</u>, kaj du aktivaj : <u>skribi</u> kaj <u>paroli</u>...
- Ŝajnas, Felikso, ke por multaj el niaj tro izolitaj geamikoj tiu ideala, harmonia praktikado tre malofte eblas ! Ne ĉie estas grupkunvenoj, ne ĉiu kuraĝas paroli publike... kaj la legemo ne estas karakterizo de la moderna homo.
- Karakterizo...ci devus diri "karakterizaĵo", ĉu ne ? Sed estas vere, Jako, ke ne ĉie nek ĉiam estas favoraj cirkonstancoj. Sed ofte la cirkonstancojn kreas la homoj mem. La emo paroli publike en esperanto ne povas naskiĝi en rondo, kie oni nur babilaĉas en la franca, pri temoj banalaj aù gurditaj, en etoso konstipiga..
- Ha, ha! Jen mi baldaù aùdos reklamadon pri sekprunoj...!
- Hej, fulmotondro, ne serĉu, la afero gravas ! Ni devas serioze pritrakti la temon, kiun ni iniciatis en la pasinta "Laùte!" - kaj por kiu ni ricevis nenian kontribuon. Kaj se vere ekzistas iaj "sekprunoj" por varmigi la etoson de niaj kunvenoj, kial ne uzi ilin ?
- Jes, kondiĉe, ke estu kunvenoj !...
- Jako, ni ekzamenu komence la plej senesperan situacion : tiun de esperantisto paralizita en izolita regiono. Ĉu tamen, eĉ tiel, ekzistas neniu rimedo por aùdi-legi/skribi-paroli ?
- Ho jes, aùdi la E-dissendojn ĉe la radio, aùskulti kaj reaùskulti E-diskojn. Tiuj estas malmultaj, sed kial ne korespondi per sonbendoj ?
- Ci pravas, Jako, aludante pri sonbendoj. Jen moderna rimedo, eble subtaksata, certe nesufiĉe uzata kaj sume ne tre multekosta. Ĝi ebligas ankaù paroli, t.e. aktive uzi la lingvon sen la timigaj rigardoj de ĉeestantaro, kaj krome

ekkonscii pri siaj propraj prononc-eraroj. Oni komparu la propran prononcmanieron kun tiu de pli lertaj korespondantoj kaj kun la diskoj, kiujn oni disponas : Junulkurso, N.Rytjkov, k.a. Ekzistas tre bona diskaro : "Ĉu vi parolas esperante ?" eldonita en Pollando. Bedaŭrinde, ne facile akirebla... Sed eble, per registrado sur kasedoj...

- Antaŭ ĉio, Felikso, mi opinias, ke oni perdu la manion "konsumi" esperanton, kiel oni konsumas ion ajn en nia postindustria mondo...
- Ne politikumu, Jako ! Se ne, la neŭtralaj legantoj tuj malabonos !
- Ho, temas ne pri politiko, sed nur pri tro pasiva sinteno de ni, esperantistoj, fronte al nia lingvo : ni atendas tro de aliuloj. Ni atendas la prelegon de la lertulo, la iniciatojn de la asocia sidejo, de la loka sekretario, ni atendas la bultenon...
- Ne fanfaronu!
- ...kiun ni legas aŭ ne legas, sed ĉiam metas flanken, ne havante la emon sendi por ĝi proprajn kontribuojn.
- Jes, tie ni atingas la kernon de la demando, de kiu dependas la tuta estonteco de nia movado. Aŭ ĉiu progresigu la tutan movadon per sia propra praktikado de la lingvo, aŭ ni atendu, eterne, ke iuj eminentuloj faru anstataŭ ni, la decidojn, kiujn ni ne kapablas proprainiciate plenumi. Ni konsciu pri niaj fortoj - modestaj sed propraj - kaj ni uzu ilin, balaante antaŭ la propra pordo : Ni faras pli por esperanto, mem strebante kiel eble plej multe kaj korekte praktikadi la lingvon, ol alsturmante la publikon per nia "Esperanto estas plej facila lingvo".
- Efektive, Felikso, eĉ tiaj "alsturmantoj" nun ne plu multe svarmas... Ĉiu restas en sia angulo kaj atendas.
- Jako, ni uzu "Laŭte!" por viziti ĉiun angulon ! Ĝis la venonta numero !

J. & F.

Aldone, listo de kelkaj E-radiostacioj.



Kelkaj facile kapteblaj stacioj :
******************************

| | | | |
|---|---|---|---|
| ĈIUTAGE : | Varsovio | de 06.00 ĝis 06.30 | 200 m; 75,85 m; 50,04 m; 48,90 m; 41,27 m. |
| | | de 16.30 ĝis 16.55 | 41,99 m; 31,45 m. |
| | | de 22.30 ĝis 22.55 | 200 m; 75,85 m; 50,04 m; 41,27 m. |
| LUNDE | Berno (ripetota marde kaj ĵaŭde) | de 19.00 ĝis 19.15 | 75,28 m; 48,66 m; 31,46 m. |
| MARDE | Ibra radio | de 21.30 ĝis 21.45 | 50,08 m. |
| | Berno | de 22.35 ĝis 22.45 | kiel lunde. |
| MERKREDE | Berno | de 19.00 ĝis 19.15 | ondoj kiel lunde, (ripetota vendrede kaj sabate) |
| ĴAŬDE | Berno | de 22.35 ĝis 22.45 | kiel lunde. |
| VENDREDE | Berno | de 19.00 ĝis 19.15 | kiel lunde. |
| | Pekino | de 21.00 ĝis 21.25 | 47 m; 43 m; 31 m. |
| SABATE | Zagrebo | de 00.05 ĝis 00.20 | 265 m. |
| | Vieno | de 17.45 ĝis 17.55 | 48,74 m. |
| | Pekino | de 21.00 ĝis 21.25 | kiel vendrede. |
| | Berno | de 22.35 ĝis 22.45 | kiel lunde. |
| DIMANĈE | Vieno | 06.45 ĝis 06.55 | kiel sabate. |
| | Radio Roma | de 21.00 ĝis 21.20 | 50,08 m; 41,24 m; 30,90 m. |

Radio Vaticano 21-21,10h. 180 m

**************************************************

Diskoj disponeblaj ĉe la libro-servo de SAT-Amikaro :
**************************************************

Diskoserio de Junulkurso 30 FF - Minikasedo de Junulkurso 30 FF - El poezio de Julio Baghy (disko) 12 FF - Nikolaj Rytjkov 42 FF - Disko Tra la mondo (O.Tzaut) 50 FF - Kasedo Tra la mondo 50 FF - Kasedo La vojo (kun libreto) 40 FF - Adreso : B.SCHNEIDER, 38 av.République, 94320 THIAIS Poŝtkonto : SCHNEIDER, PARIS 22.836.36 U. Sendokostoj : 20% ĝis 25 FF, 15% ĝis 50 FF, 10% super 50 FF.

**************************************************

Ekzistas krome la lernmaterialo "ASSIMIL" mendebla ĉe via kutima librovendejo. Decidu mem, ĉu la elspezon vi povas elteni... Plej bone, prunteprenu la bonajn diskojn aŭ kasedojn ĉe amik(in)o kaj pirate registru ilin sur etkostaj kasedoj... Sed vi certe ne atendis tiun konsilon, ĉu ne ?

## RECENZO

E. Archdeacon. LA MISTERO DE NIA SURTERA EKZISTO
esperantigita de k-do André Caubel. - La Juna Penso 131A. 1979.

Kiel facile oni metas etikedojn sur personajn nomojn ! Archdeacon : "burĝo, riĉulo, fantaziulo, neŭtralisto" ! Kaj SAT-anoj eldonas verkon de tia persono ?!

Ne miros tamen tiuj, kiuj pli-malpli konis "Arĉdek"'on dum lia vivo. Al tiuj, kiuj mirus, ni diru nur : "Pripensu. Tiu teksto, originale verkita en franca lingvo, estis esperantigita de nia karmemora Caubel : ĉu tio ne devas instigi nin suspekti, ke ĝi estas por ni interesa ? Do legu ĝin sen antaŭjuĝo ; kaj ne lasu vin mallogi de la vorto mistero". Tiam ili malkovros viglan, lertan pamfleton, kiu povus esti subskribita de Sébastien Faure aŭ de Lorulot ; fortike argumentitan rezonadon, ne nur kontraŭ la katolikan klerikaron, sed kontraŭ ĉiun religion, kontraŭ ĉian kredemon ; paskvilon, kiu vipas ne nur pastrojn kaj eklezion, sed same la "bonpensantajn" burĝojn ; kiu eĉ senrespekte atakas la "Sanktan" Biblion, deŝraŭbas kaj faligas tiun uzurpan monumenton ; kiu akuzas ne nur la malican venĝeman Dion de la Malnova Testamento, sed ankaŭ tiun de la kristanoj, mensoge nomitan "bona" ; kiu senmaskigas la hipokritecon de la burĝa potencularo, uzanta la kredemon de la popolo por ĝin servutigi.

Eble iuj delikatuloj paŭtos, dirante, ke kelkaj el la argumentoj estas ne tre originalaj, eĉ gurditaj. Sed, fronte al la ĉiama religia propagando kaj al la nuna rea progresado de mistikismo, ne estas senutile ripetadi la argumentojn kaj daŭrigi la bataladon de Volter kaj de la Enciklopediistoj.

Kiuj foje aŭdis Arĉdek'on, tiuj retrovos en lia skribo la vervon de lia parolo. Tiu vigla stilo ne povis trovi pli taŭgan tradukanton ol Caubel. En la esperanta teksto pedanta esploro eltrovus kelkajn malgravajn erarojn. (Tio pravigas mian aserton, ke, eĉ por plej kapablaj verkistoj, lingva kontrolo neniam estas superflua)*. Sed ni ne harfendu : ni nur allasu nin al facila, plezura legado. Mi senhezite diras : tiu tre malmultekosta broŝuro estas eta majstroverko de du el la plej liberpensaj esperantistoj. Ĉiu raciema mondlingvano nepre volu akiri kaj legi ĝin. Valo

* Pri la Esperanta Literaturo, LJP 127B, 1978.



### Mia amiko estas mortinta !

Mia amiko Christian LAGANT sin mortigis la 2-an de decembro 1978.

Post la renkontiĝo kun la superrealisma movado, lia internacia spirito kondukis lin ĝis Esperanto, kie li partoprenis en la Junul-fako de S.A.T.
De tiu dato li estis por mi vera kunulo. Por lukti kontraŭ la entrudiĝo de la ŝtato en la Junulgasteja Movado ni kreis la M.I.A.J., baziĝantan sur federaciismo kaj memmastrumado.
En la anarkiisma movado niaj vojoj kelkfoje diverĝis tra la diversaj tendencoj, sen iam difekti nian amikecon.
Sed la ĉefa agado de Kristiano estis la kreiĝo de la Revuo "NOIR ET ROUGE", en kiu dum preskaŭ 15 jaroj kelkaj kamaradoj ĉiam kolektive skuis la tabuojn plej sanktajn, kiuj ankoraŭ kovras la liberecanan penson - framasona movado, hispana revolucio, ktp.
La revuo memvole ĉesis aperi en 1970. Dum sia aperperiodo ĝi alportis vere novan sangon al la liberecanaj ideoj.
Kristiano partoprenis ankaŭ al la aktiveco de "Informations et Correspondance Ouvrières"(I.C.O.) : arigo de informoj pri la laboristaj agadoj ekster la sindikatoj. Li skribis iam : "La revolucio estas rideto!".
Mi ne faras nekrologon. Nek ploroj nek kronoj, nur la saluto de la amikeco. J.GREGOIRE.

Dum sia junaĝo Kristiano skribis la ĉi-suban Ne-Testamenton:

Se mi mortos,
Ne penu pro mi.
Ĉu cindrigo aŭ
tombejo ?
Al mi estas egale.

Ne kantu Marseljezon
Nek Internacion
Ne serĉu nigran flagon
Nek ruĝan flagon
Nek nigra-ruĝan flagon
Ne serĉu ĉion ĉi.

Se mi havos truon
Tie ne "meditu"
Por neniu mi tie estos
eĉ se vi volas min vidi.

Mi estos pli malproksime
kun la kompanoj
feliĉa pro ilia rido
ridante kun ili.

Mi estos ĉe la fajro
sub la perfida kameno
kaj se mi alkolizias ĝin
la "Tutmonda Junularo"
ne estos trafita.

Ne tristu, amikoj,
se ne, mi iros nokte
tikli viajn piedojn
por vin ridigi. C.L.

Nia kriminala felietono : Ĉiuj kamaradoj menciitaj en la antaŭaj numeroj estas nun liberaj, sed la plimulto estas ankoraŭ akuzata, do la aferoj ne finiĝis, kaj necesas resti atentemaj.
Etienne ROCHE petis dufoje la statuton de la prokonsciencaj soldatservrifuzantoj, kiu estas rifuzita al li, ĉar lia peto alvenis ekster la leĝa templimo. Sendite al kazerno de Valence, li komencis malsatstrikon la 11an de decembro. Por pruvi, ke ni ne estas en totalisma lando, sed en liberala demokratio, la militistoj sendis lin al frenezulejo. Tio povas antaŭvidigi baldaŭan reformon "pro psikiatriaj motivoj", kiel kutime, sed tia reformo povas atendiĝi dum longa tempo.
Krome, la procezo, kiu konsistas deklari la armerifuzantojn netaŭgaj pro frenezeco,estas plej kritikinda.
Sendu protestleterojn al :
Ministro pri nacia demenco, 14 rue Saint Dominique, F 75007 PARIS. Commandant de la Vème région militaire, F 69990 LYON.
Viaj deputitoj kaj aliaj lokaj moŝtoj (eĉ se vi ne voĉdonis por ili).
Sendu kuraĝigajn leterojn al :
Etienne ROCHE, Service de Neurologie, Hôpital des Armées Desgrenettes, bd. Pinel, F 69003 LYON.

Minacoj kontraŭ obĵetantoj : La Fédo, unu el la asocioj de obĵetantoj en Francio, estas minacata per nuligo pro subteno al armerifuzado kaj pro diskonigado de la leĝo pri prokonscienca soldatservrifuzo. La verdikto estos baldaŭ eldirita en Nancy.
Petu la subtenan petskribon al : Comité de soutien à la Fédo, 54 rue de la Hache, 54000 NANCY.

Jacqueline.

*********************************************************

Poŝ-taglibro "SAVELLI" 1979 proponas 365 elektitajn poŝlibrojn por la bonaj kaj malbonaj tagoj, de la nun kuranta jaro. Por ĉiu tago unu libro. La desegnoj estas de SOULAS. Restas ankoraŭ iom da loko por memorteni la rendevuojn.
"Editions Savelli", 33 bd. St Martin, F 75003 PARIS aŭ ĉe la paralelaj librejoj. Tiu eldonejo disponigas ankaŭ aliajn titolojn.



Jen trafa aldono al nia listo de E-radiodissendoj :
*************************************************
Ekde majo 78, Portugala Nacia Radio elsendas en esperanto ĉiudimanĉe, precipe informojn pri la lando, kelkfoje E-novaĵojn. Jen la elsendhoroj kaj frekvencoj :
De 19.20 ĝis 19.30 (franca vintra horo). Ripetoj : 21.50 ĝis 22.00 ; 22.50 ĝis 23. ; 23.20 ĝis 23.30.
Frekvencoj : 49,79 m (6025 kHz), 30,80 m (9740 kHz).
Precipe la ripetoj estas tre bone aŭdeblaj en nia regiono.
Tio estas ege kuraĝa iniciato en lando, kie la E-movado longe suferis persekutojn fare de la dekstra diktaturo kaj kiu nun suferas gravajn ekonomiajn malfacilaĵojn. Oni respondas al ĉiuj leteroj. Viaj alskriboj multe utilos plidaŭrigi, plibonigi ja plilongigi la disaŭdigojn.
Adreso : Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, Lisboa I, Portugalio. (Komunikis : R.Pontnau).

**************************************************************

Nia stulta ludo : Progresi... retroirante !
***************** . *************************
Estas akuzativa eraro en la 4 unuaj paĝoj de tiu ĉi "Laŭte!".
Kiu trovos ĝin, tiu rajtos kisi la kulpul(in)on.

**************************************************************

La Kalendaro "1979" de S.I.A. aperis ! Ĝia temo : La Ŝtata Terorismo, kun resumo en esperanto. Ekzistas en la franca kaj en la hispana. Mendu al : S.I.A., 4 rue de Belfort, F 31000 TOULOUSE, poŝtkonto n° 1230-50 S. Prezo : 12 FF, sed 10% da rabato ekde 10 ekzempleroj. La nura kalendaro, kiun oni neniam forĵetas eĉ post la 31a de decembro !

**************************************************************

Bonvenon al "Le Radis Noir" (La nigra rafano), informilo kaj popolesprimilo prizorgata en Noyon de nia kdo P.Grollemund ! Zorge presita kun ilustraĵoj, kun nete liberecana enhavo. Jam aperigis artikolon pri esperanto (numero elĉerpita).
Abono : 12 numeroj kontraŭ 10 FF sendotaj al : Le Radis Noir, B.P.11., F 60400 NOYON .
Vi ĉiuj ja scias, ke la nigra rafano estas plej saniga. Ĝia suko plej efikas kontraŭ la hepataj kolikoj. La ĉi-supre aludita gazeto krome efikas kontraŭ la rasismaj, ĉasismaj, aŭtoritatismaj plagoj !

Belega festkarto estas eldonita de la Esperanto-Klubo Renna, kunlabore kun bretonaj asocioj (Jes, karaj kontraŭetnistoj, estas temp' malfermi la okulojn !). Tiu festkarto entenas du citaĵojn : unu en la bretona, unu en esperanto. Ĝi tute taŭgas por novjara festo, propraj festoj, naskiĝdatrevenoj, jubileoj, ekzamensukcesoj pri etna/universala lingvoj, ktp!
Adreso : Club-Espéranto Rennais, 4 rés. St Jean Baptiste de la Salle, F 35000 RENNES, pĉk: Rennes 391 45 W.
Prezoj : por 10 ekzempleroj : 18 FF + 1,80 FF (afranko)
20 ekzempleroj : 32 FF + 3,50 FF (afranko) ktp.

********************************************************

El "Infera Proverbaro" de William Blake, tr.Long.

Parolemu elkore, kaj maliculo evitos vin.
Ĉio kredebla figuras la veron.
La vulpo prizorgas sin, sed Dio
prizorgas la leonon.
Preĝoj ne plugas! Laŭdoj ne rikoltas!
Ĝojoj ne ridas! Doloroj ne ploras!
La kapo supera, la koro tuŝeblo,
la generiloj belo, la manoj kaj
piedo proporcio.
Kia l'aero al birdo aŭ la maro al fiŝo
tia
La korvo volis ĉion nigra, la strigo
ĉion blanka.
Abundo estas belo.
Se la vulpo konsilus, la leono ruziĝus.
Plibonigo rektigas vojojn; sed vojoj
malrektaj sen plibonigo estas geniaj
vojoj.
Prefere mortigu infanon en lulilo ol flegu
senagan deziron.
Kie homoj mankas, naturo ne naskas.
Diru la veron kompreneble, kaj oni kredos.
Sufiĉe! aŭ tro.

(La ceteraj ekstraktoj el "Infera Proverbaro" - nun finita - aperis en "Laŭte!" n-roj 2, 12, 13, 14, 15, 16).

**
*



BOTANIKO :

## LEONTODO kaj TARAKSAKO

En la familio de kompozitacoj ekzistas du genroj, inter aliaj, pri kiuj ni atentu, ĉar en esperanto regas iom da malordo.

Temas pri Leontodo aŭ Leontodono kaj Taraksako (ĉi lasta ne kuŝas en P.I.V.). Verŝajne botanikistoj sentas ian malkomforton kiam ili legas la signifon de leontodo en nia plej plena vortaro.

En la genro Leontodon ekzistas specioj : L. hispidus (fr.: L. hispide); L. autumnalis (fr.: L. d'automne)...

En la genro Taraxacum, ekzistas tre konata, tre utila planto, la specio T. officinale aŭ T. vulgare aŭ T. dens-lionis. Ĝi respondas en franca lingvo al pissenlit, dent-de-lion aŭ pissenlit officinal.

En botaniko kaj en franca lingvo la afero estas klara, sed ne en esperanto. En P.I.V. ĉe la vorto leontodo ni legas la signifon, kiu kongruas grandparte por taraksako. Alidirite, leontodo, kiu normale estas el genro leontodon estas en tiu vortaro el genro taraxacum. Plie, ĉe leontodo ni legas : "en kelkaj landoj uzata kiel salato; = buterfloro de la diablo(z)" Tiu ĉi lasta populara diro koncernas verŝajne toksan, venenan planton, sekve ne leontodon.

Ĉe la vorto leontodono la klarigo estas ŝajne ĝusta, sed kial ne leontodo ?

Por ke nia lingvo restu klara kaj simpla necesas meti ordon en kelkaj kazoj precipe ĉe plantoj, kie la vortaro botanika tutmonde rekonata kaj uzata estas tre helpa.

Tre interese estus, se fakuloj kaj amatoroj pri botaniko (speciale ne-francparolantaj) konigus sian opinion pri tiu temo.

Ĉu, precipe inter pol-, rus-, german-, hebre-parolantoj iu povas diri la nomon (specio) de la planto, kiun Zamenhof nomis "buterfloro de la diablo" ?

Rim.: Uzata kiel salato estas taraksako oficina, sed ankaŭ kelkfoje leontodo aŭtuna.

En P.I.V. la vortoj "leontodo" kaj "leontodono" devus esti anstataŭataj de :
- Leontodo, kun la teksto kuŝanta ĉe "leontodono".
- Taraksako, kun la teksto de "leontodo" ĝis la vorto "salato". Restas por lokigi : "buterfloro de la diablo(z)".

E.Dazun

## ATENTU: URANIO ĈE NI !

Ĉie en la lando nun svarmas nova speco de prospektoroj, kiuj celas la malkovron ne de oro sed de uranio. (Tion postulas la energi-politiko de niaj klarvidaj regantoj). En Perigordo, ili elektis kiel areon por sia traserĉado la regionon, kiu sterniĝas inter Saint-Aulaye kaj Saint André de Double. La "Teramikoj" provis alarmi la loĝantojn pri tiu danĝero-graveda situacio. Jen eltiraĵo el suplemento de "La Baleine" n°36, majo 78 (grupo de Ribérac).

"Vian komunumon koncernas la prospektorado de uranio. En 1974 estis decidite sen popola konsulto pri la neceso grandskale disvolvi nuklean energiproduktadon kaj de tiam pluraj minaj societoj serĉadas uranion tra nia regiono. La unuaj esploroj estis verŝajne sufiĉe kontentigaj, por ke la COGEMA (Ĝenerala kompanio je nukleaj ercoj) deponu en septembro 1976 peton pri ekskluziveca rajto serĉadi uranion. Tiu permeso t.n. de Puymangou - ricevita, jes, dankon! - ampleksas 7800 ha (78 km²).

De tiam la minaj kompanioj daŭre prospektoradas eĉ ekster tiu teritorio.

Kiel elfosi uranion ? Pro la konsisto de la subgrundo, eksplutado de la uranivejnoj en nia regiono devus esti farataj per "subtera likvigo" t.e. injektado de solvilo (sulfatacido aŭ sodo) rekte en la teron tra drilegaj truoj kaj pumpado de la solvaĵo enhavanta radioaktivan ercon. Por plibonigi la produktokvanton, la subgrundo povus esti antaŭe dispecigita per eksplodiloj.

En aliaj lokoj klasikaj ekspluatmetodoj estus uzataj i.a. surfacaj minejoj aŭ galerioj kun ŝaktoj. Tiukaze, grandaj kvantoj da minaĵo tiam estus elfosataj, pistataj kaj acidumataj surloke, postlasante malmolajn kaj likvajn elĵetaĵojn.

Elfosado de uranio : danĝero ! La riskoj estas multnombraj kaj seriozaj. Riskoj koncerne la sanon, unue. Malfacile estas ekscii kiaj danĝeroj nin minacas, ĉar :

- la esploroj teknikaj aŭ medicinaj restas sekretaj.
- la radioaktiveco estas nek videbla, nek sentebla... male, ĝiaj efikoj estas insidaj, nerektaj, pli-malpli prokrastitaj i.a. nombrokreskado de la kancermalsanoj, genetikaj damaĝoj ĉe la idaro, k.s...
- la administraciaj regularoj fiksitaj laŭ maniero jam pridiskutebla eĉ ne ĉiam estas obeataj.

Due, polucio de la vivmedio. Post injektado en la subgrundon de altgrade korodanta likvaĵo kun la celo "lesivi" rokojn per eksplodiloj antaŭe disrompitajn, estas neeble kontroli ties subteran iradon. Tial, neeviteble, parto de tiu likvaĵo trasorbiĝos en la tertavolojn kaj fine elverŝiĝos en fontojn, riveretojn, lagetojn aŭ subterajn akvotavolojn.

Se "tradicia" ekspluatado, estos bezonate elfosi grandajn kvantojn da ercoj, kiuj, post ekstraktado de 2 aŭ 3 promiloj de uranio, amasiĝos en "montetojn", kies radioaktiveco estas malgranda sed ne neglektebla. Oni devas ankaŭ prikalkuli la bruegojn (mineksplodoj, gigantaj pistiloj kaj ventumiloj), la eligon de radioaktivaj polveroj kaj de radongaso.

... "

trad. P. Signoret.



## STUDO PRI KOMPARATAJ RELIGIOJ : KATOLIKISMO KAJ ESPERANTISMO

Post longa restado en la kristana medio (romkatolika tendenco) kaj post iom malpli longa restado en la esperantista medio (laborista tendenco), mi liveras tiun etan komparigan tabelon al ĉiuj ŝatantoj de religihistorio :

| | |
|---|---|
| Imito de Jesuo-Kristo | Vivo de Zamenhof |
| Vivo de ĉiuj sanktuloj | Vivo de Lanti |
| Groto de la Kristnasko en Bethlehem | Statuo de Zamenhof en parko de Bialistoko |
| Sankta meso "Mi estas kristana, jen mia gloro, mia espero kaj mia subteno" | Solena malfermo de E-kongreso "Sub la sankta signo de l' espero..." |
| "Ave, ave, ave Maria" | "Leviĝu, en mizer' dronanta" |
| 1527 : kondamno de Martino Luther pro herezo kontraŭ la Biblio, la Sankta Tradicio kaj la ktpo. | 1978 : "Ni ne povas solidariĝi kun etnistoj, ĉar Lanti diris sur paĝo tioma..." |

La malbona kaprino,
Jacqueline.

Vere, tiu ĉi nova generacio nenion plu respektas ! (ndlr)

## REZOLUCIO de la kongreso de "UNION PACIFISTE DE FRANCE"

La Pacista Unuiĝo, rememorigante, ke la batalo kontraŭ ĉiuj militoj (kiu estas ĝia ekzistokialo) nedubeble nepigas la kontraŭstaron al ĉiuj militismoj, ĉiuj armeoj, ĉiuj naciismoj,

- deklaras sin, denove, tute solidara al la viktimoj de ĉiuj armeoj, kaj, aparte en Francio, al la kontraŭsoldatiĝuloj, la nesubmetiĝuloj, la kamparanoj, kiun la nacia defendaparato volas forpeli de ilia tero, kaj al ĉiuj persekutatoj pro opinioj kaj kontraŭmilitisma propagando ;
- konstatas kun kontento, ke la ideo pri unuflanka malarmado (lanĉita en Francio far Sébastien FAURE kaj poste far Louis LECOIN) manifestiĝas nun en pluraj aliaj landoj (Italio, Svisio, Danio...), cetere subtenata pro la intereso, kiun la Internacio de Militrezistantoj dediĉas al tiu fundamenta nocio;
- garantias sian fratecan subtenon al la kamaradoj de la pacŝipo FRI, kiu entreprenas pacistan ĉirkaŭiron de la mondo por disvastigi la informadon kaj instigi al unuflankaj iniciatoj por malarmado;
- atentigas, unuflanke pri ĉiuj sistemoj politikaj-ekonomiaj, kies ĉefa bazo estas fabrikado, negoco kaj ŝakrado de armiloj, aliflanke pri la trompemo de ĉiuj registaroj, kiu aperas pli-malpli cinike, pli-malpli hipokrite, sur la tuta tersurfaco, kaj nun precipe en Azio, Meza kaj Proksima Oriento;
- avertas kontraŭ la starigo de E.K., kiu estus nenio alia ol Super-ŝtato naciista kaj militista, kiel ĝiaj komponantoj, Super-ŝtato starigata por konkuradi kun la aliaj blokoj, mezuri sin laŭ ili, kaj fine por prepari novan mondmiliton;
- reasertas, ke la defendo de la homo estas kontraŭa al ĉiu nacia defendo, ke la landlimoj kaj nacioj malhelpas ĉian liberiĝon, ĉian emancipiĝon de la individuo, kaj ke la pacistoj, la liberaj homoj, povas esti nur civitanoj de la mondo, ĉar por ili la sola patrio estas la Homa Patrio.

Esperantigis <u>H. Masson</u>.

Adreso de Pacista Unuiĝo de Francio : 4 rue Lazare Hoche, F 92100 BOULOGNE BILLANCOURT. Tiu kongreso okazis la 11an kaj 12an de novembro 1978 en Suresnes (antaŭurbo de Parizo). Tiu organizo estas favora al esperanto. La esperantigita teksto de ĝia propono por unuflanka malarmado de Francio estas havebla ĉe la broŝurservo de SAT (La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut) kontraŭ 0,50 FF + afranko, aŭ ĉe la Pacista Frakcio de SAT: J.LEPEIX,82 av.Jaurès,F67100 STRASBOURG

---



## Nia felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO...

Li klarigas, ke temas pri tie kutima interŝanĝilo. Oni aĉetas - kredite, se necese - tiujn kuponarojn, kiuj validas en ĉiuj regionaj kooperativaj magazenoj.

<u>Lunde, 22an de oktobro</u> :

Ni iras al G.P.U. por akiri niajn pasportojn. Tiel, en ĉiuj urboj, kiujn ni trairos, ni devos tuj deponi niajn pasportojn al la polico, kiu, post senfinaj klopodoj, konsentos aŭ <u>rifuzos</u> al ni la restadpermeson, kio trudos al ni mirindajn diplomataĵojn por daŭrigi nian vojaĝon. Ni perdos multe da tempo ankaŭ por akiri la ĉiutagan "loĝbileton".
Ni vizitas la gazeton IZVESTIA por presigi aliajn kartojn; sed necesas mem malkovri kaj alporti la paperon !
Dank'al niaj esperantistaj k-doj, kiuj akiras por ni ankaŭ littukojn, ni povos tranokti en luksega hotelo : unua etaĝo por la politikaj aŭ sindikataj eminentuloj, la dua por la laboristoj.
Ni vizitas la "Klubon de la Domservistoj", kie nia kdo T. gvidas sian unuan esperanto-lecionon. Oni tre frate akceptas nin. La kurso konsistas el trideko da lernantoj, ĉiuj junaj. Sur la muro, murgazeto kritikas per karikaturaĵoj la tro malfruan horon de la kino (22a), ekspozicio el tutmondaj revuoj kaj gazetoj klarigas la celojn kaj rimedojn de Esperanto. Fine de la kurso, oni starigas kurs-komitaton, ĉefe por respektigi minimuman disciplinon. Post niaj paroladetoj la ĉeestantaro insiste petas, ke ni vizitu la artan salonon de la Klubo. Imagu unu el la plej belaj scenejoj de Parizo : vastega salono, tute brile nova. Ĉe la muroj la grandaj portretoj de la ĉefaj gvidantoj de la Revolucio. Tabelo, kun azenkapo fumanta pipon : "Estas malpermesate fumi" kaj tiu azeno rikane respondas : "Sed ja fumas mi!". Tio estas okulfrapa kaj komika. Sur la scenejo tre junaj geknaboj provludas teatraĵon.

<u>Marde 23an de oktobro 28</u>

Ni vizitas la distrikt-komitaton de la Junaj Komunistoj.
Tie oni klarigas al ni
- ke estas du specoj de pano pro la deficitaj rikoltoj.
- pri la bonstato de la preĝejoj : Estas ankoraŭ multaj "fideluloj", kiuj donacas en la monkolektadoj kaj ankaŭ kaŝita eksterlanda helpo. La ŝtato helpas nur kiam temas pri preĝ-

ejoj transformitaj en klubojn.
- ke oni ricevas salajron laŭ siaj kapabloj; tial la salajroj povas varii de 50 ĝis 500 rubloj ĉiumonate. Kompartiano ne povas ricevi pli altan salajron ol tiun fiksitan de la organizoj. Pri tio oni aparte atentas. Por egala laboro la virinoj ricevas salajron egalan al tiu de la viroj.
- ke ekzistas solidarkasoj, ĉefe por la maljunuloj kaj la ĵusnaskintinoj; la ĵusnaskitoj ricevas senpagan vestaĵaron.
- ke la bicikloj estas multekostaj, tial ke estas preskaŭ neniu biciklo-fabriko en Sovetio; ke la industrio havas pli urĝajn taskojn, ankaŭ estas pli urĝaj aferoj por importi.
- ke estas senlaboreco pro manko de kreditoj por rekonstrui aŭ krei entreprenojn.

Ni vizitas la "Infanvilaĝon". Pri tio mi multe legis en Francio, sed mi konfesas, ke mi tamen estas surprizita. Imagu tutan vilaĝon, kun ties domoj, stratoj, ties klubo kaj lernejoj; ĉio estas tre pura sed iom mizeraspekta. Oni vizitigas al ni la klubon, la laborejojn, la manĝejon, la dormejon, la distrejojn kaj fine la skriboĉambron de la Direktoro. La plenkreskula personaro estas kiel eble plej malmultnombra : estas 200-300 infanoj kaj nur dudeko da plenkreskuloj. Ĉio farebla de la infanoj estas lasita al ilia - gvidata - iniciatemo. Tiel ili estas panbakistoj, kuiristoj, ili lavas kaj purigas la domojn kaj la stratojn, ktp. En la lernejo kaj en la manĝejo ambaŭ seksoj estas miksitaj kaj sidas sur sama benko. Nur en la dormejo ili estas apartigitaj. Ni eniris hazarde en ĉambrojn sen plenkreskuloj. Tie regis admirinda silento kaj disciplino. Tuj tradukitaj de mia kamarado, jen la demandoj, kiujn faris la infanoj :
Ĉu en Francio la riĉuloj kaj la malriĉuloj frekventas saman lernejon ? Ĉu la instruisto estas kamarado kiel ĉi tie ? Ĉu estas grupoj de pioniroj ? Oni ricevas la impreson pri frua matureco ĉe tiuj infanoj. Ni vizitas diversajn laborejojn... Jen la horo de la vespermanĝo. Oni kondukas nin al la manĝejo. La ĉefan laboron kaj diskretan kontroladon faras 2-3 viroj, kiuj ekservas la porciojn, sed lasante la pladojn sur la tablo, lasas la infanojn daŭrigi la memservadon. La infanoj invitas nin manĝi kun ili. Poste la direktoro vizitigas al ni la porknabinan dormejon. Modestaj sed perfekte puraj, tiuj vicoj da blankaj litetoj! Perfekta ordo regas, la libroj estas zorge ordigitaj en individuaj mebletoj kaj ĉiuj litoj estas kovritaj per blankega ŝirmotuko.

(daŭrigota)



Krucvortenigmo n-ro 11. Solvo :

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | A | V | I | N | J | O | N | O |
| 2 | N | | R | | E | K | I | P |
| 3 | A | R | K | I | D | U | K | O |
| 4 | R | E | | N | | P | O | Z |
| 5 | K | L | | K | O | I | T | I |
| 6 | I | | V | O | R | T | I | C |
| 7 | O | K | C | I | T | A | N | I |

En tiu enigmo plagis do aĉaj etnistoj, kontraŭtabakuloj, anarkiistoj - kaj eĉ seksobsedato. Se vere, eĉ en krucvortoj oni ne povas esti neŭtrala... kien iras la mondo ?
- Al kaoso, mia kara, al kaoso !
(Aliaj enigmoj estas bonvenaj)

---

"EKOLOGIA RONDO ESPERANTISTA"(ERE) naskiĝis !
*****************************************

...kaj jam aperis ĝia unua eldonaĵo : "EKOPERANTO" (10 paĝoj en formato A4), provizore prizorgata de Kdo Bert de Wit, Leidsevaart 52, NL 2114 AD VOGELENZANG, Nederlando, al kiu vi bonvolu vin turni, se :
* vi deziras aldoni vian adreson kaj interesiĝojn al la unua listo de la interesatoj, kies adresojn publikigas "Ekoperanto" ;
* vi deziras ricevi "Ekoperanto"n. Ĉiu ekzemplero de la unua numero kostis 1,50 guldenojn, inkl. afrankkostojn.
* vi deziras mendi la ekologiajn E-glumarkojn "Atomenergio? Ne,dankon!" (vd.Laŭte n-ron 16,p.18). 10 grandaj glumarkoj aŭ 10 folioj da malgrandaj kostas 11 gd. (20 kostas 21,50 gd. - 30 kostas 32 gd.) inkl. afrankkostojn. Ĝirkontnumero: 2703131. (prefere NE per bankoj).

Krom la tre utila adresaro vi trovos en "EKOPERANTO" interesajn artikolojn kaj informojn, rubrikon "Praktika ĝardenumado" (ĉi-foje pri karotoj). Redaktoroj de E-gazetoj povos facile ĉerpi el ĝi, kio plaĉas al ili.
Kdo Bert ne disponas multe da tempo kaj volonte transdonos la prizorgadon de tiu gazeto al alia(j) persono(j), kiuj havas pli da tempo. Anoncu vian pretecon al li !

*****************************************

La venonta "Laŭte!" aperos komence de marto. Kontribuojn sendu antaŭ la fino de februaro. Antaŭdankas, la stencilulo

*****************************************

Directeur de publication: J. Simonet.
Imprimeur: C.Baudé, F 47340 Laroque.
CPPAP 58651

## V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J

(Denun tiu ĉi rubriko aperos meze de "Laŭte!" sur kolora papero. Bonvenon al ĉiuj informoj, pri ĉiuj grupoj, el kiu ajn regiono ! Aldonu mem koloron al "Laŭte!" )

### * TULUZO, Ho TULUZO ! Vekiĝu !

Kara amikino, kara amiko !
Eble vi jam de longe lernis esperanton.
Eble vi iom forgesis ĝin.
Eble vi ne kuraĝas paroli ĝin, timante malkorektaĵojn. TIO TUTE NE GRAVAS !

Vi tute certe opinias, ke
- la mondo bezonas facilan kaj neŭtralan internacian lingvon ;
- esperanto povas (aŭ devas) esti tiu lingvo;
- esperanto bezonas vian subtenon.

Kial ne ĉeesti de tempo al tempo nian publikan kunvenon, kiu okazas ĉiun 4-an vendredon, je la 21a horo, en la Laborborso (enirejo : 1 rue Merly) de Tuluzo ?

Tie vi povas :
- praktiki vian duan lingvon ;
- pasigi agrablan momenton, ĝuante nian kamaradecan etoson.

Ĝis baldaŭ do ! Kore via Tuluza SAT-Amikara Grupo
(9,r.Cerdagne, 31300)

### * L O T I O

Sekve de la oktobra informkunveno en Souillac, malfermiĝis E-kurso en Salignac, en la lernejo, ĉiusabate. Sekvas la kurson gvidatan de kdo Signoret 11 personoj.
Kdo Thon gvidas propran kurson en Figeac.
Kiuj nun pretas kunlabori por provi informkunvenon en Cahors ? Skribi al Laŭte aŭ al kdo Signoret.

### * ESPERANTO EN STRASBURGO

Kdino Lépeix gvidos kurson ĉiun ĵaŭdon inter la 18a kaj 30 kaj la 20a en la kadro de la kvartala asocio A R A N, rue de Nomény en Neudorf.
Informkunveno la 18an de januaro 1979.

## * ĜERSIO

Kursoj okazas en LECTOURE (en la urbodomo) : 10 gelernantoj kun kdo Bourgeat, kaj en AUCH : 6/7 gelernantoj kun kdo Alex Dupouy.

## * ORIENTAJ PIRENEOJ

El letero : "En la lasta n-ro vi aldonis specialan rubrikon pri la vivo de la esp. grupoj en la suda parto de la lando. Estas bonege, kaj tiel mi esperas kontakti plurajn geamikojn el aliaj regionoj ol Rusiljono kaj eble aranĝi renkontiĝojn. Ĉi tie en Argelès... estis starigita E-kurso, kiun partoprenas pli ol 10 lernantoj kaj -inoj. La kurso estas gvidata de nia eminenta profesoro kaj amiko Llech Walter el Perpignan, kiu simple sed profunde interesas la gelernantojn pri nia esperanto-movado, tiel ke oni povas aserti senmensoge, ke la kurso estas vera sukceso en tia eta urbo Argelès..."
Sugesto de Kribo : Ĉu Argelès ne estos ideala rendevuloko por iam aranĝi renkontiĝon kun niaj kataluniaj geamikoj ?

## * KATALUNIO

Jen la nova adreso de la Esperantista Klubo de Amikoj de UNESKO en Barcelono : Strato aŭ carrer : Ausias March n°29 -1er pis, BARCELONA, Hispanio.
Ni atendas gratulleterojn okaze de la venonta inaŭguro.
Diversaj artikoloj pri esperanto aperis en gazetoj :
- NUEVA EPOCA (de la Vegetarana Societo): 3 paĝoj pri la vivo de Doktoro Zamenhof.
- AVUI = Hodiaŭ : kataluna ĵurnalo (2 artikoloj).
- LUCHA OBRERA (Laborista Lukto) de S. Carlos de la Rapita, eta vilaĝo sude de Tarragona : duonpaĝo pri esperanto.

Okazis ekologia manifestacio en Barcelono, kie partoprenis preskaŭ 100 000 personoj. La kamparanoj vendis legomojn kaj fruktojn sur Kataluna Placo. Estis miloj da anarkiistoj kaj simpatiantoj kaj la esperanto-grupoj de Barcelono.

E-grupo LIBERECO

## * GIRONDIA VIVO

- En Oktobro ni kunvenis en la flankaurbo en LE CANON. 21 personoj ĉeestis. La urbestro akceptis nin kaj favore parolis pri esperanto. La urbestraro konsentis fari turismajn klarigfoliojn en esperanto , kaj intencas ĝemeligi sian komunumon Lège-Cap Ferret kun sama urbeto en

# VIVO en la ESPERANTO-GRUPOJ

(Sub tiu ĉi rubriko aperas informoj pri la aktiveco de ĉiuj grupoj, el kiu ajn regiono)

## * TULUZO, HO TULUZO !

La tuluza SAT-Amikara grupo organizas ĉiun kvaran vendredon sian publikan kunvenon, kiu celas doni al ĉiuj esperantistoj eblecon praktiki la lingvon. Ĝi okazas en la Labor-Borso (enirejo : 1 rue Merly) je la 21a horo ĉiumonate.
Estu bonvenaj !

Via SAT-Amikara Grupo Tuluza.

## * BRESTA RONDO ESPERANTA naskiĝis !

Sub la nomo "Bresta Rondo Esperanta" naskiĝis grupo, kiu celas vivigi la lingvon internacian ĉe Bresto, ĉiel eble utiligante ĝin por internaciaj rilatoj kaj propagandi ĉe l' progresemuloj, por ke konsciu ili utilecon kaj neceson de Esperanto en la homlukto por kultura emancipiĝo kaj politika liberiĝo kaj ke ili malfermiĝu al la sendogma, senlima, senrasa kaj sennacieca koncepto.
Ĉar ne senpolitikuloj estas la membroj, ne neŭtrala estas la grupo. Tamen kultura rondo ĝi estas, malfermita al ĉiu, kondiĉe ke li aŭ ŝi estu akceptita de ĉiuj. Sian propran agon respondecas ĉiu kaj la de l'grupo agadoj ne povas esti sen ĉies akordoj. Pri respondeco kaj grupaj agadoj, interkonfidu kaj juĝkapablu la membroj mem.
Povas la grupo organizi eventuale kursojn kaj ankaŭ organizas konversacikunvenojn por praktiki la lingvon. Sed ĝia precipa kaj por- kaj peresperanta agado rilatu la eksterajn eventojn kun plej malfermita spirito kaj respekto al la individueco far la membroj.
La ĉi-supraj principoj aprobendas de l'membroj.

La grupo nun kunvenas ĉiujn unuan kaj trian mardon en M.P.T. de l'Harteloire. Por ĉiu kroma informo skribu al SAT-Amikaro 67 av.Gambetta, 75020 PARIS.

## * Langvedoka-Rusiljona Federacia Kongreso en Montpellier

okazos la 31an de marto kaj 1an de aprilo 1979 :

La kongreso okazos en la protestanta instituto pri teologio (1, avenue Villeneuve d'Angoulême, en la suda parto de la urbo). Tie ni vespermanĝos kaj povos tranokti, sed la nombro de la dormĉambroj estas limigita : 1 dulita, 1 trilita , 7 unupersonaj. Oni povas mendi hotelon.

Programo : sabaton je la 15a : laborkunsido., 19a : vespermanĝo, 20a30 : distra vespero, surpriza programo.
dimanĉon je la 9a : laborkunsido. 12a : komuna manĝo en restoracio. 14a : vizito de la urbo.
Aliĝu rapide, ĉiuokaze antaŭ la 14a de marto. Dankon !
Prezoj : vespermanĝo : 23 F. En la instituto : dormĉambroj 1-persona 23 F, 2-lita 30 F, 3-lita 33 F.
En hotelo, bonvolu indiki la prezon aŭ la kategorion.
(komunikis L. Ensuque).

* ESPERANTISTA SEMAJNO ĈE MARO (Sète) :
****************************

De la 16a ĝis la 23a de septembro 1979 ni, Groupe Esperantiste de Montpellier, 5 rue Docteur-Roux, 34000 Montpellier, organizas esperantistan semajnon en LAZARET. Lazaret estas tre agrabla kaj komforta feriejo en parko ĉe la mediteranea maro. Tie oni povos bani, studi, babili, promeni, ludi... laŭplaĉe.
Matene divers-nivelaj kursoj estos proponataj al laboremuloj.
Posttagmeze ekskursoj, vizitoj... Vespere ludoj, kantoj, prelegoj...
Prezo : loĝado kaj 3 manĝoj - en unupersona ĉambro : 570 FF.
- en 2-persona ĉambro : 500 FF, por aliĝo antaŭ la 15a de majo; 600 FF kaj 530 FF ĝis la 1a de julio. Ni rezervis nur 40 lokojn.
Aliĝo valoras nur kun garantia sumo de 50 FF. (pĉk : 1 487 48 Montpellier, nome de la Grupo).
(sendita de L. Ensuque)

* La VII-a Renkontiĝo de portugalaj esperantistoj okazos
********************************************************

en norda urbo PORTO de la 15a ĝis la 17a de junio 1979.
Informojn petu al Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr.João Couto, 6 r/c A, P 1500 LISBOA, Portugalio.

* L O T - departemento : 11 gelernantoj en Salignac, 7 en Souillac. Ekzistas nun ebleco
*********************

aranĝi E-informkunvenon en CAHORS. Ĝis baldaŭ !

* Ĝ I R O N D I O : Sukcesa estis nia kresp-kunveno !
****************

Sabate posttagmeze, la 10an de februaro, ni kunvenis en la lernejo de Cavignac. La celo estis : interkonatiĝi kun la gelernantoj de ĉiuj kursgvidantoj kaj enkonduki tiujn komencantojn en nian grupon.
30 personoj ĉeestis. Multaj gejunuloj inter ni. Ni kune kuiris krespojn ; pluraj kamaradoj kunportis la necesan materialon. Manĝeme, ni englutis la tutan krespaĵon ; kaj kompreneble, ni trinkis...eĉ alkoholaĵon !!
Post tio, la ĉeestantoj estis tute pretaj por aŭdi, paroli, legi kaj skribi esperanton.
Sidintaj kaj pliproksimiĝintaj sur malkomfortaj benkoj, ni unue faris ludon, kies nomo estas : "Petro vokas Paŭlon!".
Ĉiuj partoprenis, ĉar oni bezonis scii nur la nombrojn ĝis 26. Se iu dezirus pliajn detalojn pri tiu ludo, bonvolu skribi al la Ĝirondia grupo ! La tuta ĉeestantaro tre bone kaj tre rapide kalkulis. Tiam ni ŝanĝis la agadon.
Nu, due, ĉiuj konsentis kanti. Bele ni kantis tre simplan kanteton : "Frato Jako". Ni dividis nin inter 4 grupetoj; kaj ni sukcesis melodian ĉenkanton.
Post tio, ĉiuj meritis trinki !!..
En tre afabla kaj tre bonhumora etoso, tiu kunveno finiĝis.
Ŝajnis, ke ĉiuj kamaradoj, junaj aŭ maljunaj, komencantaj aŭ spertaj, praktikinte la lingvon, ĝojis. Ĉu per la krespoj ? Ĉu per la trinkaĵo ? Ĉu ambaŭ ? Ĉu pro la ludo ? Ĉu pro la kanto ?
Ne gravas ; ĝojo ŝprucis el esperanta agado !
Joël.

- Nia venonta kunveno okazos kun la bordoza pacifista grupo en la sidejo de ĉi-lasta, 21 rue de la Devise, BORDEAUX, la 9an de marto, je la 21a horo.
Celo: interkonatiĝi, interkonigi la propran agadon, por eble, poste, labori kune.

* Ĉe la M O N D C I V I T A N O J :
***********************************

La "Instituto pri Mondanistaj Studoj", kreitaĵo de la "Kongreso de la Popoloj", ĉi tiu mem kreitaĵo de la Mondcivitanoj, kunvenos ĉi-jare en la kastelo de La Lambertie apud Ste Foy-la-Grande (Girondio) de la 11a ĝis la 16a de aŭgusto.

La "Kongreso de la Popoloj" decidis, ke dum tiu studperiodo estos Esperanto-tago la dimanĉo 12a. Prelegoj kaj diskutoj matene, promenado posttagmeze.
Vi certe komprenas nian esperon, ke ĉiuj esperantistoj de la Sudokcidenta regiono provos kaj ke multaj sukcesos enigi en sian programon la viziton al La Lambertie, almenaŭ la 12an, por montri plian fojon la valoron de nia lingvo kaj ĝian nepran neceson por unuiĝanta mondo.
Ni ankaŭ supozas, ke la prelegtemoj kaj la prelegantoj instigos kelkajn partopreni la semajnan studadon.
(La provizora programo aperos en venonta "Laŭte" - Red.)

## *HISPANIO

Multaj kunvenoj okazis en Hispanio de la 9a ĝis la 17a de decembro okaze de la Zamenhof-tago.
En Sabadell okazis esperanta semajno, dum kiu ĉiuj aŭtobusoj de la urbo portis esperantajn kaj katalunajn flagojn.
En Barcelono revigliĝas la Esperanto-grupo en strato Zamenhof dank'al amiko Juan SOLE : str. Zamenhof nº15, Barcelona-20. En venonta n-ro listo de la E-grupoj en Hisp.
Anonceto : Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, precipe Eŭropo.
Jesuo PEREZ aŭ Grupo Esperanto-Libereco
Apdo - 27 066, BARCELONA Hispanio.

## *REGIONA RENKONTIĜO en CLAIRAC (47)

la 5an kaj 6an de Majo 1979.
- Kunvenejo: Salle Tivoli en la Junuldomo (apud la urbodomo)
- Sabaton ptm : Ekzamenoj - Vizito de la urbo (muzeo kaj malnova kvartalo. La muzeo situas en malnova domo (13a jc) nomata "Domo de Montesquieu". Dimanĉon matene : interkonatiĝo libroservo,kunsidoj. 14.30/15.30: Generala kunveno de AERA. 15.30.Debatoj.Temoj proponitaj: "Ĉu estonteco por esperanto? -"Alergio kontraŭ la laboro".
- Loĝado: 3 hoteloj (ordinaraj).Manĝoj: inter 20 kaj 30 FF.

Anoncu vian intencon partopreni, trapasi ekzamenon, loĝi en hotelo, manĝi en la restoracio, prezenti programeron al :

Jacques SIMONET, BP.9, 47320 CLAIRAC.

Ni provos liveri lastmomentajn informojn en la venonta bulteno, fine de aprilo. Ĝis baldaŭ en Clairac !

Germanio, Nederlando, Svisio... Esperantistaj interŝanĝoj povus okazi per tiu ĝemeligo.
Tre vigla estis tiu kunveno. Henriette Chaillot jam malfermis kurson en Le Canon, kun kvin gelernantoj.
- En CENON, en Maison pour Tous, Olivier Tzaut, svisa E-kamarado, kantis por ni, sabaton la 21an de oktobro. Bedaŭrinde ni estis tre malmultaj, ĉar ni eksciis tro malfrue la daton de tiu kantado. Tamen, ni ĝojis dum la tuta vespero, aŭdante belajn kantojn, esperantlingve kaj franclingve.
- En Saint André de Cubzac, ni deĵoris en budo ĉe la festo de la Socialista Partio, la 29an de oktobro.
- En novembro, la 4an posttagmeze, ni kunvenis en EYSINES, en la urbodomo. Ankaŭ tie ĉeestis la urbestro kun 20 personoj, 8 neesperantistoj. Pluraj ĉeestantoj venis el "Amicale Laïque", kiu ŝajnas tre vigla en tiu urbo. Esperanta sekcio estis proponita. Simone Gaillard zorgos pri tio; sendube, ŝi tuj malfermos kurson. Plie, ni parolis pri ĝemeligo kun eksterlanda urbo. La aferon jam pripensis la urbestraro, kiu konsentas elekti urbon, kie ekzistas forta esperantista grupo.
- En Decembro, la 5an je la 19a horo, ni kunvenis "hejme", en Maison pour Tous, en CENON. Joël

## *SIESTADO en AĜENIO...

Nur 14 personoj (el departementoj 24,31,32,47) partoprenis en Aĝeno la 17an de dec., kio estas la negativa aspekto de tiu aranĝo, kies formulon necesos ŝanĝi, aŭ kiun ni tute rezignu. Diskutoj tamen viglis kaj eĉ la eks-OKK lektura trovis momenton por pridiskuti kiel uzi la kongresprofiton.
Nur 7 personoj en Monflanquin, la 13an de januaro. La invitita publiko ne aperis.

Venontaj kunvenoj de Aĝenia Esperanto-Rondo :

* Sabaton 24an de februaro, 14.30, en la stacidomo de Laroque-Timbaut.
* Sabaton 24an de marto, 14.30, ĉe Noémie Mouneyrou, 1, rue Gillet, en Marmande.
* Aprilo : nenio projektita, sed se iu havos proponon...
* Sabaton 5an kaj Dimanĉon 6an de Majo, en CLAIRAC, regiona renkontiĝo. Okazos ekzamen-sesio por la unuagrada diplomo. Ĉiuj kandidatoj bonvolu jam informi kdon Simonet, BP.9 47320 CLAIRAC. Krome A.E.R.A. profitos de la aranĝo por

havi tie sian ĝeneralan asembleon. Ĉiuj AERA-anoj nepre ĉeestu do tiun kunvenon, kies tagordo aperos en la venonta "Laŭte!". Ĉiuj regionaj SAT-Amikaraj grupoj kaj membroj, ĉiuj amikoj de "Laŭte!" estas invititaj. Jam sendu al kdo Simonet viajn proponojn por ke la programo estu kolektive starigita.

* Junio : nenio fiksita. Ni atendas proponon.
* fine de julio kaj/aŭ fine de aŭgusto : Esperanto-semajnoj en Moulin de Carguessac, 47470 BEAUVILLE. La loko estas krome proponita al la Junulfako de SAT, kiu mem fiksu la datojn kaj okupojn por sia eventuala restado.

************************************************************

La sekreta E-vivo en Ĝ I R O N D I O : La januara kunveno estos jam okazinta - mardon 16an de januaro - kiam tiu ĉi "Laŭte!" alvenos. Posta kunveno en Ĝirondio :

* Mardon 20an de februaro, je la 19a, en "Maison pour Tous", de CENON.

************************************************************

Pri "Laŭte!" kaj ties "Adresaro" :
********************************

* Al la novaj abonantoj de "Laŭte!" : dankon pro via kunlaborado ! Denun "Laŭte!" estas via esprimilo. Uzu ĝin laŭplaĉe ! Multaj el vi ne povas ricevi la adresaron "1978", kiu estas elĉerpita. Ni planas aperigon de adresaro 1979, kiun ĉiu nepre ricevos.
* De ĉiu abonanto, de ĉiu responsulo ni petas sendon de plej multaj adresoj kaj informoj pri ĉiuj funkciantaj grupoj kaj asocioj. Tiel nia adresaro povos plej utili al ĉies interrilatoj. Por agi kune, ni unue interkonatiĝu !
* "Laŭte!" en Skandinavio :
  Denun "Laŭte!" havas peranton en Skandinavio :
  - Kdo Pelle PERSSON, Svartviksvg.14 S 123 52 FARSTA
    Poŝtkonto n-ro 68 41 61 - 3
  
  Ni esperas, ke iom post iom aperos perantoj en multaj aliaj mondpartoj kaj ke sekve la abonantaro/kontribuantaro fariĝos vere internacia... kun emo al sennacieco.
* Nia esperehle ne tro fora celo : ĉiumonata, ofsetita, sennacieca gazeto !
  Se oni ne rajtas revi jarkomence, kiam do ?...